

Eŭropa Bulteno

Junio 2012, Numero 117

EŬROPA KOMISIONO NE AKCEPTIS REGISTRI LA POPOLINIATON DE EEU

En la regulara limdato fine de majo reprezentanto de Eŭropa Komisiono respondis al nia iniciato ke la Eŭropa Komisiono rifuzis registri nian himnan proponon, ĉar ili taksas ke ili ne havas tian kompetenton, ĉar “neniu membroŝtato agnoskis Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo, kaj oni ne povas konsideri Esperanton parto de la komuma kultura heredaĵo” (la preciza anglalingva formulado estas sur la dua paĝo de la respondo de la Komisiono). Post konsultiĝoj la prezidanto de EEU Seán Ó Riain sendis plendan leteron al Eŭropa Komisiono en kiu li substrekas ke la intenco de nia Iniciato ne estis promocii Esperanton sed kontribui al fortigo de la eŭropa ideo kaj eŭropaj valoroj de paco kaj demokratio per ebligo al civitanoj el diversaj landoj kaj lingvokomunumoj mem kanti la himnon kune. Li ankaŭ aldonis multajn formalajn agnoskojn kiuj montras ke ja neniu lando agnoskis E-on kiel sia kultura heredaĵo sed multaj landoj subtenis diversmaniere oficiale E-on.

Post 7 tagoj la sama reprezentanto de EK respondis al nia plendo ke ne ekzistas iu proceduro por ke la Komisiono rekonsideru sian decidon kaj ke la sola proceduro estas apelacii al la Ombudsmano aŭ al la Eŭropa Kortumo.

La estraro pripensis ĉu eblas apelacii al Eŭropa Kortumo kaj konstatis ke tio kostus tro kaj EEU ne povas pagi, do ni rezignis pri la ideo. Sed restas la eblo apelacii al Eŭropa Ombudsmano (defendanto de homaj rajtoj). La prezidanto de EEU kaj Jozef Reinart ankoraŭ konsultiĝas kun kelkaj juristoj pri la argumentoj kiujn oni skribu en tia apelacio. Ili jam trovis kvar leĝajn argumentojn, sed volas ankoraŭ plibonigi ilin por pligrandigi la ŝancon ke la Ombudsmano subtenos nian pozicion, por ebligi registron de la propono. Post lia respondo ni kunmetos informon por la publikaj informrimedoj ĉie en EU.

Estas interese ke la Komisiono eĉ ne volis doni ŝancon al la civitanoj decidi mem pri la himno, sed per la rifuzo registri la iniciaton provas forigi la rajton de la civitanoj elekti ĉu ili subtenas la proponon aŭ ne. Sed inter la 34.000 laborantoj en la Komisiono ekzistas diversaj vidpunktoj kaj pri Esperanto kaj pri Eŭropo kaj povus esti ke la timema kaj maldemokratia decido kiu rifuzis registri la iniciaton ne estos la fina decido.

Zlatko Tišljarić

REAKTIVIGO DE LA CIVITANA SOCIA PLATFORMO DE EU POR PLURLINGVISMO

Eŭropa Komisiono (EK) invitis al Bruselo por la 29a de junio 2012 al plenkunsido de Civitana Socia Platformo de EU por Plurlingvismo (Civitana Platformo) ĉiujn membrojn, 29 civitanajn organizojn, inter kiuj estis Eŭropa Esperanto Unio (EEU).

Civitana Platformo laboris dum du jaroj (2009-2011), kaj prezentis en junio 2011 al EK sian raporton kaj rekomendojn. La plenkunsidon partoprenis 23 civitanaj organizoj inter ili estis EEU, kies celo estis reaktivigi la platformon en 2 venontaj jaroj (2012-2013). Nome de EEU partoprenis Seán Ó Riain, Prezidanto kaj Jozef Reinart, asistanto de la estraro.



Enkonduke de la plenkunsido sinjorino Belén Bernaldo de Quirós, estrino de la unuo por plurlingvismo de EK, informis pri politiko de EK por strategia evoluo de plurlingvismo kaj pri konkludoj pri lingvaj kompetencoj por plifortigo de moveblo de civitanoj de la Konsilio de Ministroj de Edukado, Junularo, Kulturo kaj Sporto, kiu kunsidis la 28an kaj 29an de novembro 2011. Ministroj en siaj konkludoj alte taksis la agadon kaj rekomendojn de la Civitana Platformo kaj rekomendis al EK daŭrigi ĝian agadon, kiu estas „aliro de malsupro“ kaj „voĉo de civitanoj“.

Dungitoj de EK prezentis rezultojn de la esploro Eŭrobarometro 2012 „Eŭropanoj kaj lingvoj“ kaj „Eŭropano trarigardon pri lingvaj kompetencoj“. Kiel kutime la esploro estas farita je memtaksado de respondintoj, kio ne montras veran konon de lingvoj. Ĉefa mesaĝo de la esploro (27000 respondintoj en 27 EU landoj) estas, ke „98% de respondintoj diris, ke lingvolernado estas bona por iliaj infanoj sed testoj akcentas mankon en scioj“, kaj ke „72% de civitanoj en la 27 EU landoj subtenas la oficialan EU-politikon de 1+2“, t.e. ke ĉiu civitano lernu la denaskan lingvon kaj du aliajn lingvojn.

Teresa Condeço, respondeculino en la unuo por plurlingvismo de EK, informis la partoprenatojn pri la rolo de la Civitana Platformo en la nova politika kunteksto, kiu laboros enkadre de 2-jara projekto (2012-2013), en kiu estas planitaj po du plenkunsidoj jare kaj laboro organizita laŭ prioritatoj, kiuj estos preparataj dum la venontaj semajnoj. EK planas pligrandigi la Civitanan Platformon dum unu monato ĝis 30 organizaĵoj. Aliaj organizaĵoj povos havi statuson de aligitaj, kunlaborantaj organizaĵoj.

Uwe Mohr, la estro de la Civitana Platformo, informis, ke la reaktivigita Civitana Platformo eliros el siaj rekomendoj kaj konkludoj de la Konsilio de ministroj kaj iliaj rekomendoj. La Platformo devos esti pligrandigita per kelkaj eŭropaj civitanaj organizoj, kiuj plenumos la kriteriojn starigitajn de EK kaj havos emon aktive kontribui al la laboro de la Civitana Platformo. Ĉiuj nunaj membroj povos rekomendi kandidatajn organizojn, el kiuj EK konsideros ilian taŭgecon por fariĝi membroj de Civitana Platformo. Oni devos starigi 3 - 4 prioritatojn kaj eviti ripetadon de tio kio jam estis farita. Grava estos kreo de efektiva strukturita dialogo de Civitana Platformo, ke ĉiuj membroj povu efektive kontribui kaj kunlabori kun aliaj.

Estis interkonsentite, ke la venonta plenkunsido okazos en Bruselo la 5an de oktobro 2012. Ĝis tiam devos esti selektitaj novaj membroj kaj aliancaj organizoj de la Platformo kaj interkonsentitaj prioritatoj, ke oni povos komenci efektive kunlabori.

Dum la plenkunsido reprezentantoj de la Goethe Instituto kaj la Instituto Cervantes prezentis kursojn de la germana kaj hispana. Temis pri retaj kursoj en instruata lingvo, sed ne pri plurlingva instruado. Post tiuj ĉi prezentadoj Jozef Reinart informis pri modela plurlingva portalo de EU „Slovak.eu“, kiun preparis kaj kunordigas kree riĉa eŭropa civitana organizo Edukado@Interreto (E@I) de Slovakio, kiu rete, senpage en sep lingvoj instruas la slovakon kaj informas pri Slovakio. La portalo estas post unu jara funkciado tre sukcesa ne nur en instruado de la slovakaj al 2500 registritaj lernantoj en 112 landoj en la mondo, sed ankaŭ antaŭenigo de plurlingvismo. Li aldonis, ke E@I prezentis en februaro ĉijare ĝian duan etapon. Li informis ankaŭ pri aliaj projektoj de Edukado@Interreto, kiujn efektivas Espa2.eu, Deutsch.info kaj aliaj. Li disdonis al partoprenantoj DVD version de Slovak.eu kaj informoj pri Deutsch.info. Ĉiuj estis vere surprizitaj pri la vera plurlingvismo de la portaloj. Fine de sia prezentado Jozef Reinart rekomendis al EK, ke E@I fariĝu membro de la Civitana Platformo, ĉar ĝi pretas kunlabori kun ĉiuj membroj de la Platformo por komune prepari projektojn por antaŭenigi vastan plurlingvismon en EU. La estrino de la unuo por plurlingvismo de EK kaj aliaj membroj de la Platformo alte taksis la plurlingvan nivelon de la portalo Slovak.eu kiel veran modelon por EU.

La Platformo interkonsentis pri sia 9-membra 'gvida komitato', kies membro fariĝis ankaŭ Seán Ó Riain, prezidanto de EEU, kiu havos bonan eblecon pozitive influi ĝian gvidadon, ke estu en ĝi prezentitaj kaj efektivitaj niaj rekomendoj. EEU havos eblecon pere de la membreco de E@I en la Platformo pli antaŭenigi veran plurlingvismon. Li akcentis la rekomendojn de EEU kaj informis pri EEU-kongreso en Galivo inter la 16a kaj 20a de julio 2012 pri la temo „Lingva instruado en EU: lerni pli, kosti malpli“, super kiu transprenis la aŭspicion prezidento de Irlando kaj salutos ĝin ministrino de Irlando por eŭropaj aferoj.

Fine de la plenkunsido sinjorino Belén Bernaldo de Quirós, estrino de la unuo por plurlingvismo de EK, informis pri la preparo de granda konferenco pri plurlingvismo, kiun organizas EK kaj okazos dum la Kipra Prezidanteco en EU en Limasol de la 26a ĝis la 29a de septembro 2012, al kiu EK invitos ankaŭ la membrojn de la Civitana Platformo. Post la kunveno, S-ino Bernaldo de Quirós private petis Seán Ó Riain helpi ke la irlandaj prezidanteco de EU, kiu venos tuj post la kipra prezidanteco, formale metu plurlingvismon inter siaj prioritatoj. Ŝi klarigis ke tio estos granda helpo al EK, ĉar ekzistas homoj ene de EK kiuj ŝatas malpliigi la gravecon de la politiko de plurlingvismo. Seán Ó Riain jam skribis al irlandaj diplomataj kontaktoj pri la afero.

El la vidpunkto de EEU la plenkunsido estis tre sukcesa.

Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU
Jozef Reinart, asistanto de EEU estraro

ĈU DESUBISMO AŬ DESUPRISMO?

Tiu demando reaperas regule dum la jardekoj kiam oni parolas pri informado.

Ĉu pli efike konstrui solidan bazon (informante la simplajn civitanojn kaj ilin varbante) aŭ aliri la povregantojn, la opiniformantojn, la kulturajn elitojn, nome tiujn kiuj decidas?

La itala movado ne kapablis elekti kaj, tio estas tre bona... elekto! Pro tio en suda Italio, en Sicilio, en urbo Mazara del Vallo okazadas de unu jaro kursoj por esperantigi la lernantojn de la mezgradaj lernejoj, ankaŭ perspektive al ontsomera nacia kongreso. Imagu la entuziasmon de la kongresanoj: alveni tien kaj esti akceptataj de knaboj, junuloj kiuj alparolas vin surstrate en esperanto!



Sed, kiel mi jam diris, la itala movado ne subtaksas la validecon de la desuprisma aliro al informado. Kaj – tre interese laŭ geografia vidpunkto – tio okazis en Trieste, tute nord-oriente, ĉelime kun Slovenio.

Kiam oni parolas pri Trieste oni celas la Triestan Esperanto-Asocion kun ĉekape s.ino Edvige Tantin Ackermann. Al ili turniĝis Eŭropa Esperanto-Unio por kunorganizi konferencon pri la temo “Kia estus Eŭropo nun, se ne ekzistus Eŭropa Unio?”. Aparte interese estas ke la temo estis elektita pli malpli antaŭ du jaroj, kaj kiom ĝi iĝis aktuala nuntempe!

Dum tri tagoj – de la 9-a ĝis la 11-a de majo – kunvenis en Trieste tre interesa partoprenantaro, tute ne tipa por niaj aranĝoj: krom la kutimaj esperantistoj – kelkaj italoj, kaj EEU-respondeculoj, agantoj kaj simpatiantoj – partoprenis plentempe sesdeko da ne-esperantistaj gejunuloj el Aŭstrio, Kroatio, Slovakio kaj Slovenio, kiuj vizitadas la universitatojn pri

ĵurnalismo de tiuj landoj. Kaj tio jam estas iom nekutima. Ili venis, partoprenis – dank’ al la profesieca interpretado inter la oficialaj lingvoj: angla, esperanto, itala de seso da homoj kiuj travivis tiun sperton enfermitaj tuttage en varmaj budoj – kaj poste kunvenis en grupoj por pridiskuti temojn ligitajn kaj al ilia studado kaj al la temoj prezentitaj prelege de la gastoj. Kaj jen la alia eksterordinareco: la gastoj! Venis, prelegis, restis preskaŭ la tutan tritagan periodon, kafrinkis, vespermanĝis, fotiĝis en amikaj kaj ne formalaj rondoj, du eks-ŝtata prezidentoj: Stjepan Mesić (Kroatio) kaj Milan Kučan (Slovenio); nunaj kaj iamaj eŭroparlamentanoj: Thomas Jansen – iama prezidanto de PPE (Germanio), Giorgio Rossetti (Italio), Gianni De Michelis eksa ministro pri eksterlandaj aferoj (Italio), Antonio Cancian (Italio); kaj ankoraŭ universitataj profesoroj: Božo Repe (Slovenio), Mladen Staničić (Kroatio), François Grin (Svislando), Stefano Amadeo (Italio); la prezidanto de la Unesko-Centro de Trieste: Paolo Alessi, kaj fine (sed ne laste) esperantistoj kaj EEU-respondeculoj: Seán Ó Riain (Irlando) kaj Zlatko Tišljar (Kroatio-Slovenio). Sed estis aliaj gravaj kunlaborantoj, kiuj gvidis la laborgrupojn: Linda Maria Ravo, Gordana Vilović, Stefano Amadeo, Miloš Horváth, Stjepan Malović, Vlado Sušac, Heinz Peter Wassermann. La tempo estis tre inteligente dividita: unua sesio: Historia kun prelegoj pri la originoj kaj kialoj de eŭropa unuigo; kiel kaj kial Slovenio eniris Eŭropan Union kaj kiel EU influis la atingon de paco en Nord-Irlando. La dua sesio temis pri Politiko, nome ĉu la Sudorienta

Eŭropo havas alian alternativon krom EU (imagi ĝuste en tiuj tagoj daŭre venis informoj el Grekio kie, post la unuaj elektoj malsukcesis unu post la alia la klopodoj havi funkciopovan registaron); kaj tre interesa prezento de la spertoj de plurnacia Ŝtato (iama Jugoslavio) kiel mesaĝo por nuna EU; kaj fine la konstato ke en tiu momento EU troviĝas ĉe decida vojkruciĝo: ĉu integriĝo nur ekonomia aŭ ankaŭ politika? La tria sesio priekzamenis ĝuste la Ekonomion per prelegoj pri la fiska kunordigado necesa por ha sukcesa ekonomia politiko, pri la dinamiko de lingvoj en la tutmondiĝo kaj la rolo de lingva ekonomio en tiu kunteksto, kaj pri la socia solida reco post la traktato de Lisbono. La fina sesio temis pri Homrajtoj: la situacio de handikapitoj en Eŭropo, kun aparta atento al la studentoj, la identeca karaktero de lingvoj, kaj la la eŭropa identeco laŭ religia vidpunkto.

Kronis la tutan aranĝon publika ronda tablo pri la graveco de EU por konservado de la paco en Eŭropo kaj en la mondo, al kiu partoprenis per tre interesaj kontribuoj: Stjepan Mesić, Milan Kučan; Gianni De Michelis kaj Thomas Jansen, sub lerta estrado de Giorgio Rossetti. La urbo, la regiono ne povis preteratenti la konferencon: ĉiutage aperis tutpaĝaj kaj duonpaĝaj artikoloj, intervjuoj kun la gastoj kaj kun la organizantoj, la regiona televido multon filmis kaj multon elsendis, sed m havas nur partan rigardon al tiu flanko, ĉar verŝajne ankaŭ la amaskomunikiloj de la apudaj landoj informis pri tio sed mi ankoraŭ ne havas pri tio sciigojn. Kion diri?

Gratuloj estas memevidentaj, admiro pri la kapablo organizi kaj arigi tiom da gravuloj (eĉ pli ol kelkaj UK!) kaj tio venas ne nur de la partoprenintoj sed ankaŭ de la aŭtoritatoj kiuj donis la patronecon. Jes tio povas ŝajni rutina: la komunumo, la provinco, la regiono, la universitato, jes, vi pravas, sed la fakto ke la Prezidento de la Itala Respubliko – Giorgio Napolitano, havigis al s.ino Ackerman medalon de la Prezidantaro kiel konkreta signo de estimo kaj admiro... do tio certe ne estas rutina ankaŭ ĉe ne esperantistaj kongresoj kaj konferencoj okazantaj dise tra Italio.

Bedaŭro pro via ne ĉeesto sed ĝuu havi la eblecon almenaŭ legi la prelegojn, ĉar kompreneble aperos la Aktoj de la Konferenco!

Michela Lipari



Tiu ĉi projekto estis financata de la Eŭropa Komisiono.

JARO DE TIBOR SEKELJ

EKSPOZICIO EN FRANCO

Dum la franca landa E-kongreso en Saint-Aignan de Grand Lieu okazis ekspozicio pri Tibor Sekelj, laŭ la bildoj faritaj de Arno Lagrange. La ekspozicio estas en Esperanto kaj en la franca. Ni prezentis filmon pri li, kaj poste mi prezentis la ekspozicion, farante diversajn komentojn pri la montritaj bildoj. La granda novaĝo estas, ke nun estis francigita Kumeŭaŭa – la filo de ĝangalo, sed momente ni ankoraŭ serĉas eldoniston.

Claude Nourmont

PLIA PRELEGO EN KROATIO

Dum la Kroata Esperanto-kongreso okazinta en Koprivnica Zlatko Tišljar prelegis pri la vivfilozofio de Tibor Sekelj kaj liaj esplorceloj. Partoprenis dudeko da kongresanoj post kio evoluis interesa diskuto.

Zlatko Tišljar

PREZENTO EN LA URBA MUZEO DE SENTA

En la serbia urbo Senta la Urba Muzeo, en kiu Tibor Sekelj lasis plej grandan parton de siaj kolektoj dum la vojaĝoj (ĉefe indiĝenaj muzikinstrumentoj, maskoj kaj ĉapoj) okazis la 16-an de junio prezento de la explorekspedicio en Sudameriko kiun gvidis Tibor Sekelj « Sur la Spuroj de Tibor Sekelj. Prezentis Stipan Milodanović kaj Josip File.

Zlatko Tišljar

DOKUMENTO PRI EVENTOJ RILATE LA TIBOR-SEKELJ-JARON

En la socia retejo ipernity Arno Lagrange aperigis tri dokumentojn okaze de Tibor-Sekelj-jaro. La artikolon pri lia unua edzino <http://www.ipernity.com/blog/arno.lagrange/391626>, la dokumenton en kiu li kolektas ĉiujn eventojn ligitajn al tiu ĉi jaro <http://www.ipernity.com/blog/arno.lagrange/364393> kaj la informon pri honorigoj de Tibor Sekelj en vikipedio <http://www.ipernity.com/blog/arno.lagrange/123728>. Tiel vi povas sekvi la aktivadon en la Jaro dise tra la Terglobo.

Zlatko Tišljar

KOMUNA GERMAN-DANA-POLA ESPERANTO-KONGRESO 2012 EN BERLINO

De la 25a ĝis 28a de majo, ĉirkaŭ pentekosto, kiun sekvas en Germanujo ŝtata feritago lunde, okazis en Berlino la Komuna Esperanto-Kongreso de la dana, germana kaj pola Esperanto-



asocioj, al kiu venis entute 255 partoprenantoj el 18 landoj. La kongreso estis samtempe la 89a germana Esperanto-kongreso, kiu same kiel kelkaj antaŭaj okazis kunlabore kun la najbara landa sekcio por igi la kongreson pli interesa, allogi pli da partoprenantoj kaj pligrandigi la eblecojn praktiki Esperanton. Trafe la temo de la kongreso estis "Partneroj en Eŭropo", kiun la partoprenantoj prilumis aŭskultante prelegojn, en organizita debato kaj praktike dum la daŭro de la kongreso.

Vendredon vespere la iama prezidanto de la Germana Esperanto-Junularo, la nuna estro de la Germana Esperanto-Instituto kaj ekster Esperantujo ĉefe pro sia aktiveco en la piratpartio konata profesoro pri lingviko Martin Haase prezentis idealojn kaj realojn de la Eŭropa Unio kaj ties demokratio, samtempe montrante eblecojn plibonigi ĝin per la koncepto de likva demokratio. Post tiu klera komenco, la kongresanoj kantis gvide de Kim kaj koruso el la pola urbo Nowy Sącz la Eŭropan himnon laŭ versio de Broccatelli. Pliaj temrilataj programeroj estis interalie prezento kaj diskuto de eblaj roloj de Esperanto en Eŭropa Unio de la lingvisto Detlev Blanke kaj la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain, podia diskuto pri ĝemelurbaj rilatoj kaj prezento de Eŭropuniaj projektoj utiligantaj Esperanton.



En la vespera programo ravis la partoprenantaron ĉiuvespere la pola koruso, kiu en varia konsisto kantis polajn kaj Esperantajn kantojn kaj prezentis teatraĵeton. Elstara programero estis la "Historio de Universalaj Kongresoj", teatraĵo de Saša Filipović kaj Georgo Handzlik, kiu en ekzemplodona Esperanto ironie prilumis la gloran pasintecon kaj mokis kongresajn kutimojn. En trilanda vespero kantis tri bardoj el tri landoj diversstile: Kim el Danujo, Stefo el Germanujo kaj Georgo Handzlik el Pollando. Ĉiu siamaniere interesis la publikon, kiu en



granda aŭlo kun bonega sceneja tekniko povis sekvi la spektaklon. La tagan programon gastigis novkonstruita kvartala renkontiĝejo, kiu provizis bonegan lokon por babilo, manĝi - kaj partopreni la programerojn.

Interesege granda urbo kaj varma somera vetero estis du malamikoj de la kongreso, kiuj motivigis konsiderindan kvanton

de partoprenantoj ne ĉeesti kelkajn programerojn kaj memstare esplori la urbon. Tio eblis ankaŭ dum la ekskursita tago, en kiu la organizantoj proponis vojojn ekkoni la urbon per kaj transe de la kutimaj turistaj itineroj. Surprize multaj aliĝis al ekskurso en la proksiman Spree-arbaron, kiu jam gastigis la Junularan E-semajnon en 2010 kaj plaĉas al turistoj pro riveretplena arbaro kaj la minoritata kulturo de la soraboj.

La kvaran tagon de la kongreso partoprenantoj jam devis adiaŭi unu la alian. Restos en memoro la sento, ke ne nur dum la kongreso ni estas "partneroj en Eŭropo". Espereble la plektitaj kontaktoj kaj (ek)flegitaj amikecoj kontribuas al interkompreno kaj eble ankaŭ al pliaj projektoj.

Felix Zesch

KONGRESO DE UNUIĜO DE FRANCAJ ESPEARNTISTOJ 2012 EN SAINT-AIGNAN DE GRAND LIEU

Nin bonvenigis aperitivo kun verda trinkaĵo nomita Esperanto kaj aliaj, poste vespermanĝo sub tendoj antaŭ la kastelo. Notindas, ke la kongresejo estis impona kasteleto, iom simila al tiu en Greziljono, en la urbeto Saint-Aignan de Grand Lieu, apud Nantes.

Kunvenis centoj da partoprenantoj, kun honora gastoj Roman Dobrzynski, kiu regalas la kongresanojn per anekdotoj, prelegoj kaj prezento de filmoj, en formo de kino-festivaletoj.



Aliaj elstaraj programeroj de la Kongreso, krom la laŭstatutaj eroj (Ĝenerala Asembleo de Esperanto-France, komitatkunsidoj, kunvenoj de GEE (instruistoj), FKEA ...), estis kulturaj partoj: prelegkoncerto de Gijom, prezentaĵo pri daŭripova evoluo, ekspozicio

pri Tibor Sekelj, ekskursoj ...

Okaze de la ĝenerala asembleo, la ĉeestantoj balotis diversajn punktojn :

- Kreado de "interasocia kotizo" kiu ebligas malaltpreze aliĝi al Espéranto-France kondiĉe ke la tuta asocio samtempe aliĝas kaj profiti impostatestilon. La loka klubo de Béziers eksperimentos tion venontjare.

- Dediĉo de la "Klubo 2000"-kaso por eldono de nova lernolibro kiu sekvas modernan pedagogion kaj eŭropan sistemon.

Kaj la estraro informis la membrojn pri:



- la kandidateco de la urbo Lille por UK 2015
- la baldaŭa eldono de nova albumo de Tinĉjo "La templo de l'suno"
- la nova retejo pri regionaj federacioj <http://esperanto-france.org/federations-regionales.85> kaj tiu de lokaj kluboj atingebla de la retejo de Espéranto-France

Okaze de la komitatkunsido, la nova estraro estis elektita :

Axel ROUSSEAU - Prezidanto

Julia HÉDOUX - Vicprezidantino pri kongreso

Philippe DEBRIX - Vicprezidanto pri eksteraj rilatoj

Sébastien MONTAGNE - Kasisto

Anne-Émilie RAVACHE - Vickasistino

Karine TEXIER - Sekretariino

Véronique BICHON - Vicsekretariino

Didier JANOT - Estrarano pri agadplano

La kongreso 2012 estis organizita de la Esperanto-sekcio de loka sporta kaj kultura ALC, kune kun la estraro de Esperanto France. Aparte laŭdindas la laboro de Solange Goan, Julia Hédoux, Claude Nourmont kaj Sébastien Montagne.

Pli da informoj pri la kongreso 2012 : <http://esperanto-france.org/nantes2012>

Alex Kadar

VICPREZIDANTINO DE EEU EN GRAVA EŬROPA KONFERENCO

La 28-an de junio en Bruselo okazis konferenco de Eŭropa Komisiono pri la temo „Renkonten al demokratia fondaĵo de Eŭropa Nova Ekonomia kaj Financa Ordo“, en kiu partoprenis pluraj gravaj funkciuloj de EU-organoj, inter ili Guy VERHOFSTADT (MEP kaj prezidanto de la liberala frakcio en la EP, profesoro Ingolf PERNICE kaj doktoro Mattias WENDEL. kaj la celo de la seminario estis serĉi solvojn por savi eŭron kaj EU-on. Interalie ili proponis komunan eŭropan elektronikan publikan medion por ke la gvidantoj pli proksimu al la popolo. La ĉefa tendenco de la prelegoj estis plifortigi eŭropuniajn organojn kiuj havu pli da kontrolo en ĉiuj fakoj.

Post la konferenco mi iom diskutis kun sinjoro Wendel kaj poste sendis al li la jenan leteron (en la franca):

Bonan vesperon sinjoro Wendel,

Post la konferenco vi afable aŭskultis min dum kelkaj minutoj.

Mi parolis pri miaj zorgoj koncerne la lingvan diversecon en EU. Efektive neniu brito membris en la diskutpanelo. Profesoro Ingolf PERNICE kaj vi mem, tiel ankaŭ viaj kolegoj,

estas germanoj. Kaj Sinjorino GOULARD kaj Sinjoro BIANCO estas francoj.

Do tiam kial paroli angle?

Kion ni faru por ŝanĝi tion?

Mi ankaŭ parolis pri la Europa Himno, kies Esperanto-tekston verkis Umberto BROCCATELLI (1931-2010), fervora itala federalisto.

En la aldonajo vi trovos la partituron kaj multe da tradukoj (kiel klarigoj, ne por kanti).

Amike via,

Flory Witdoeckt

vicprezidantino de Europa Esperanto-Unio

TRA POLLANDO IRAS FORTA VOKO

En majo ĉijare mi pilgrimis dum 3 semajnoj en la Esperanto-Mekko: Pollando. Tion mi faris okaze de la 125-jariĝo de Esperanto kaj por omaĝi la Esperanto-patrujon.

Danke al la laboro de membroj de Eŭropo-Demokratio-Esperanto Pollando, de diversaj regionaj grupoj kaj Pola Esperanto-Asocio, mi prelegvojaĝis tra la jenaj urboj: Gdańsk, Sopot, Gdynia, Varsovio, Vroclavo, Bjalistoko, Lodzo kaj Lublino.

La membroj de EDE-PL, Edward Kożyra kaj Kazimierz Krzyzak, planis renkontiĝojn kun politikistoj en Sopot kaj Varsovio kaj prelegojn en la universitatoj de Gdynia kaj Gdańsk.

En Sopot mi konatiĝis kun Prof. Edmund Wittbrodt, vic-prezidanto de la Pola Senato. Li



entuziasmas pri Esperanto kaj ĝia enkonduko en la edukan sistemon. Dum renkontiĝo kun li kaj la Eŭropa parlamentano Jan Kozłowski, ĉi-lastas asertis, ke multaj Eŭropaj parlamentanoj ne kredas pri la venko de Esperanto. Prof. Wittbrodt honorigis min per Hevelius-medalo, distingo donita en Gdańsk, la devenloko de Hevelius.

En Varsovio estis renkontiĝoj ĉe la Parlamento. La vic-marŝalo de la Senato, Jan Wyrowiński kune kun senatanoj Ryszard Górecki, Stanisław Iwan, Kazimierz Kleina, Waldemar Kraska kaj Edmund Wittbrodt akceptis min kaj transdonis al mi Senatan Medalon pro miaj klopodoj por la diskonigo de la pola kulturo kaj Esperanto.

Plie mi estis ĉe la Sejmo, kiam mi renkontis la Vic-prezidenton Jerzy Wenderlich kaj seĝmanon Romuald Ajchler. La patrino de la unua estas Esperantisto kaj la dua mem iom scipovas Esperanton.

En la hejmpaĝo de la Senato, tiu de Prof. Wittbrodt kaj de EDE-PL, aperis pollingvaj raportoj

pri ambaŭ eventoj.

Bjalistoko surprizis min jene: la vic-urbestro Alexander Sosna, forta apoganto de la Esperanto-Movado invitis min al tagmanĝo en kafejo Esperanto. Menciendas, ke li poste partoprenis mian prelegon en la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Centro.

En Lublino la agendo estis plena je vizitoj al politikistoj danke al la kontaktoj de Prof Witold Stepniewski. Mi renkontis la jenajn membrojn de la Sejmo: Jan Łopata, Lech Sprawka (eksa ministro pri edukado) kaj Krzysztof Michałkiewicz (eksa ministro pri laboro kaj sociaj aferoj) kaj la eŭropan parlamentanon D-ro Mirosław Piotrowski.

Inter la argumentoj, kiujn mi uzis por persvadi ilin estas, ke 700,000 EU-studentoj ĉiujare lernadas la anglan en Britio kaj pagas ĉirkaŭ 20 miliardojn da eŭroj, sed neniel atingas la nivelon de denaskaj parolantoj kaj tial perdas multajn eblecojn pri laboro, ekz en Bruselo, ĉe internaciaj organizoj.

Ĉiuj atentoplene aŭskultis min, konsentis pri tiu enorma lingva diskriminacio kaj pretas agi por ŝanĝi la situacion.

Kortuŝa estis la konatiĝo kun Stanisław Budzik, la arkiepiskopo de Lublino, kiu estas Esperantisto.

Okazis entute 13 prelegoj en 10 universitatoj kaj altlernejoj kaj ĉeestis 462 aŭskultantoj.

Multloke estis organizitaj renkontiĝoj kun la rektoro aŭ dekano kaj 4 el ili esprimis favoran sintenon al la enkonduko de Esperanto-kursoj en iliaj institucioj ekde la venonta studojaro.

La publiko interesiĝis pri la vasteco de la uzo de Esperanto tra la mondo; la (mal)facileco por azianoj en la lernado; kiel ebligi al la mondo la adopton de Esperanto kaj ĉu la lingva modelo de Indonezio (kie homoj parolas kaj lokan kaj landan lingvojn) estas realigebla tutmonde.

Estis plie, diversaj intervjuoj por la lokaj amaskomunikiloj: 6 radiaj, 1 televida kaj 1 ĵurnala.

En Esperanto informis ankaŭ la Pola Retradio, la Esperanta Retradio kaj Varsovia Vento.

Impresa estis la konatiĝo kun la impetaj agantoj Anna, Mateusz kaj Konstantin, membroj de la Studenta Grupo 'Aŭroro' en Vroclavo; kun Prof Maciej Zięba en Lublino kaj Małgosia Komarnicka, kiu longe vojaĝis por aranĝi kunvenon en Varsovio.

Sincere mi dankas al ĉiuj interpretistoj kaj helpantoj en ĉiuj urboj. Sen ilia subteno la turneo ne estus ebla.



En Pollando estas ja vastaj eblecoj por nia lingvo: la popolo ĝenerale konas kio estas Esperanto, miloj da Esperantistoj estas en la lando kaj politikistoj apogas la Movadon. En Lodzo, urbo kun proksimume 750,000 loĝantoj, mi eksciis, ke dum la falo de la muro estis 800 Esperantistoj. Plie, mi renkontis plurloke homojn, kiuj 20 jarojn dormis kaj volis aŭskulti mian prelegon. Tial mi opinias, ke en tiu lando ankoraŭ restas granda nombro de viglaj Esperantistoj.

Al politikistoj mi povas sugesti dungi almenaŭ 1000 instruistojn. Se ili instruas, ekz po 50 instruistojn, en unu jaro estos 50 000 novaj instruistoj.

Post la 40-jara subpremo de Franco al la regionaj lingvoj en Hispanio, en la 70aj jaroj, oni deklaris, ke kune kun la hispana, la kataluna estas oficiala lingvo de Katalunio. Ĝi estis ekuzita en administrado kaj edukado kaj nuntempe ĝi estas deviga kiel instrulingvo, tiel ke novaj generacioj rapide akiras kompetentecon en ĝi. La unua generacio devis lerni, sed nun homoj denaske parolas la katalunan.

En Eŭropo la enkonduko de la komuna monunuo eŭro postulis unu jaron ĝis la civitanoj alkiutimiĝis al ĝi. Same lingvo bezonas periodon de alkiutimiĝo, sed dum certe ne pli ol 3 jaroj, eblos atingi dulingvecon en la loĝantaro.

En la juda tombejo mi preĝis por ricevi forton de Dio kaj Ludoviko por plu labori por la fina venko.

Mi estas konvinkita, ke se politikistoj, amaskomunikiloj kaj gejunuloj kunlaboras, ni povas faligi la lingvan muron, same kiel falis la Berlina.

Poloj, do, montru la vojon al la Eŭropa Unio, ĉar per Esperanto, naskita tie, eblas solvi la lingvan problemon!

Etsuo Miyoshi

ALJUĜO DE PREMIO CIGNO 2012

Kun ĝojo mi sciigas, ke la Estraro de Fondaĵo Cigno decidis aljuĝi Premion 'Cigno' 2012 al Esperanto Asocio de Britio (EAB). Ilia modela informa agado instigis, interalie, la aperigon de artikoloj en gravaj ĵurnaloj kiel 'The Telegraph' kaj 'The Economist' kaj pro ilia informa kampanjo kadre de la Internacia Festivalo de Lingvoj ĉe la Universitato de Sheffield ankaŭ la vaste spektata televida programo 'BBC Matenmanĝo' atingis pli ol milionon da homoj.

La decido pri la premioto ne estis facile farebla, ĉar aliaj Landaj Asocioj kiuj partoprenis la konkurson, montris serioze bravajn klopodojn por konigi la publikon pri nia lingvo. Tio montras valoran engaĝiĝon ene de la Landaj Asocioj prioritatigi la informan agadon. Gratulon al ĉiuj!

Fondaĵo Cigno estis starigita en decembro 2011 por premii la agadon de Landa Asocio ene de la Eŭropa Unio, kiu plej bone informis la eksteran publikon pri Esperanto dum la periodo de unu jaro.

Ayako Kawakita (Prezidanto)

ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO DE BRNO (ĈEĤIO)

Post certa paŭzo mi denove sukcesis instrui Esperanton en Filozofia fakultato de Universitato Masaryk en Brno sub Instituto de lingvistiko kaj baltistiko. El 89 interesuloj komence de printempa semestro pri studobjekto Esperanto I restis 64 kaj el ili sukcese trapasis finan kolokvon 46 kaj ĉiu ricevis kvar punktojn, ceteraj ne partoprenis eĉ unu el ses proponitaj kolokvoj. Mi instruis tradicie laŭ video-kurso Mazi en Gondolando du horojn semajne kaj por ĉiu semajno studentoj ricevis hejmtaskon - konversacian temon. Post korekto mi redonis la taskojn al ili, por ke la studentoj vidu, kiujn erarojn ili faris kaj povu ilin eviti en la sekvaj taskoj. La lastan temon "Vidindaĵoj kaj memorindaĵoj de via loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo - estu ĉiĉerono por via eksterlanda gasto" ili devis skribi prepari kaj rakonti dum kolokvo. Kiel helpilon mi disdonis al studentoj prospekton pri Brno "Brno, la ĝusta direkto". Unu studentino el Havlíčkův Brod diris al mi, ke ŝi ĉerpis el esperanta vikipedio kaj ŝi miris, kiom da informoj ŝi trovis pri sia urbo. Plua tasko estis hejme rigardi en you tube la lastan lecionon "Mazi kaj la mistera planto" kaj rakonti en kolokvo. Kaj la tria parto de kolokvo estis solvo de interaktiva testo "Mia amiko lernas" el Edukado.net de Katalin Kováts. Por aŭtuna semestro 2012 mi havas preparitan du studobjektojn: daŭrigan kurson Esperanto II (4 punktoj) kaj Enkondukon en interlingvistikon (3 punktoj).

Josef Vojáček.

ESPERANTISTOJ DE MALTO AKTIVAS



Esperantistoj de Malto donacis librojn al la ŝtata biblioteko en La Valetta. Sur la foto: centre s-ino Cheryl, estrino de la biblioteko; dekstre de ŝi estas mi, maldekstre situas John Vella Bondin.

Mi aldonu, ke en junio aperos du miaj artikoloj en la malta sur du diversaj tre legataj dimanĉ-gazetoj. Plue, en majo mi estis intervjuita dum unu horo ĉe

unu el la maltaj radioj. En junio ĉe la ŝtata televido, Esperanto estis preparolata dum longa tempo de malta lingvisto dum lingva programo.

Carmel Mallia

INTERNACIA SIMPOZIO “APLIKO DE ESPERANTO EN LA PROFESIA AGADO” (AEPA-2012)

En Karlovo-Sopot okazis la 4-a Internacia Simpozio ”Apliko de Esperanto en la profesia agado” AEPA-2012, 15-22.06.2012. Organizantoj de la simpozio estis Bulgara E-Asocio, AIS- Bulgario, Internacia Universitato Karlovo, TOLE kaj la Regiona Estraro de la neesperantista faka asocio – Sciencteknika Asocio en Bulgario. Altaj protektantoj de la Simpozio estis d-ro Emil Kabaivanov (urbestro de komunumo Karlovo) kaj Veselin Liĉev (urbestro de komunumo Sopot).

Oficialaj lingvoj de la simpozio estis Esperanto kaj la bulgara, sed laborlingvoj la naciaj lingvoj de la partoprenintoj, kiuj ne estas esperantistoj. Kun la certigita rekta traduko nacia lingvo-Esperanto-nacia lingvo, ĉiu partopreninto kiu ne estas esperantisto havis la eblecon prelegi kaj partopreni la diskutojn. La eminenta bulgara esperantisto ing. Nikolaj Uzunov realigis la rektan tradukon.



La solena inaŭguro de la simpozio okazis en la solena salono de la urbodomo Karlovo. Ĝin partoprenis krom la partoprenintoj ankaŭ reprezentantoj de oficialaj instancoj en la lando, de bulgaraj universitatoj, fakaj sciencaj organizaĵoj, urbanoj, televido, radio kaj gazetararo. La simpozio estis inaŭgurita de prof. Boĵidar Leonov - prezidanto de BEA,

AIS-Bulgario, TOLE, rektoro de Internacia Universitato Karlovo.

Pro ofica foresto de d-ro E. Kabaivanov, la Simpozion salutis nome de la urbestro Anton Minev - unua vicurbestro de Karlovo. En la salutmesaĝo estis substrekita la pozitiva rilato flanke de la urbestro al la agado de Internacia Universitato Karlovo kaj internacia E-movado. S-ro Minev substrekis, ke ankaŭ estonte la oficialaj instancoj kaj la loĝantaro en Karlovo subtenos la E-agadon, espriminte la certecon, ke ankaŭ estonte la loka esperantistaro daŭrigos sian aktivan agadon por konfirmo de la karlova regiono kiel E-scienc-eduka centro kaj prospero de la internacia E-movado.

La simpozion partoprenis eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj scienculoj kaj fakuloj, kiel ekzemple prof. Renato Corsetti el Italio, prof. Christer Kiselman el Svedujo, d-ro Michael Cwik el Belgio, d-ro Roberto Pigro el Kipro, prof. Ilia Hristov el Bulgario, Malgosia Komarnicka el Pollando, Nebojša Stanković el Serbio k.a, kiuj ankaŭ salutis la partoprenintojn. Estis traiegita salutmesaĝo de s-ino Barbara Pietrzak – ĝenerala sekretario de UEA.

Dum la inaŭguro estis prezentita ankaŭ literatur-muzika programo. La karlova esperantistino Elena Baleva recitis poemon kaj la E-koruso de urbo Pazarĝik plenumis koncerton, kantinte E-kantojn.

Dum la simpoziaj tagoj prelegis prof. Renato Corsetti kaj Roberto Pigro pri lingvistiko, prof. C. Kiselman « Kiel plej bone faldi triangulon », prof. Boĵidar Leonov »Apliko de Esperanto en la patenta agado «, Colo Petkov pri Naturkuracado per mineraloj , ark. Ivan Necev pri La arkitekturaj monumentoj en la regiono Karlovo-Sopot, inĝ. Kosta Nesev »La karlovano Ĝon Nočev- unu de la konstruktoroj de Apolo” k.a. Interesaj kaj aktivaj estis la diskutoj gviditaj de d-ro M.Cwik pri : "Kian Europon ni volas kaj kiel?", "Solidareco en la Europa Unio, sed kiamaniere?", "Kiamaniere garantii la kulturajn kaj lingvaj identecojn en mult-kultura ĉirkaŭaĵo?", "Kia strategio por konservi la lingvan diversecon kaj samtempe ebligi mult-flankan efikan komunikadon?", "Ĉu ni devus ŝanĝi la ĉartron pri fundamentaj rajtoj de la Eŭropa Unio, por konservi kaj garantii la publikajn tradiciojn en kulturo, lingvo kaj religio je la loka nivelo?"

Dum la lastaj tagoj de la simpozio okazis la religia seminario “La rolo de la religio por la edukado de la juna generacio. La seminarion partoprenis reprezentantoj de diversaj religioj substrekinte la rolon de la religio eduki la junularon obei la noblajn principojn de la religia etiko, moralo, toleremo kaj kunlaboro inter la kredantoj, sendepende de ilia religia aparteneco.

La simpozio AEPA-2012 estis la ĉefa aranĝo en la programo de BEA por celebri de 125 jaroj de Esperanto kaj kontribuis por propagando pri Esperanto, plialtiĝo de la intereso flanke de la oficialaj instancoj al la internacia faka E-agado. La simpozio ekhavis sian rolon en la apliko de Esperanto en profesiaj kontaktoj. Tiamaniere ĝi sukcese plenumis sian bazan celon - prezenti antaŭ la nesperantistaro, fakuloj tutmonde kaj la oficialuloj, ke la internacia lingvo Esperanto ne estas nur komuna lingvo por babilado, amuzo kaj kontaktoj inter la esperantistaro, sed Esperanto povus esti kaj devas esti oficiala lingvo, por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj simpozioj.

Boĵidar Leonov

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de junio 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Michela Lipari, Jozef Reinvart, Claude Nourmont, Felix Zesch, Alex Kadar, Flory Witdoeckt, Etsuo Miyoshi, Ayako Kawakita, Josef Vojáček, Carmel Mallia, Boĵidar Leonov

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

